# ORIENTA STELO


October/oktobro 2012

NUMBER 291 NUMERO

Orienta Esperantista Federacio
Originale fondita en aprilo 1932

Eastern Esperanto Federation
Originally founded in April 1932


**Kontaktdetaloj**



| | | | |
|---|---|---|---|
| Roy Threadgold | Prezidanto | 01371850481 | roy@boydellsdairy.co.uk. |
| Ben Gosling | Sekretario | 01787247737 | benjamin.gosling@btinternet.com |
| Barrie Murphy | Kasisto | 01702472193 | celiaandbarrie@tiscali.co.uk |
| Mark Drake | Komitatano | 02085188094 | marko.drejko@gmail.com |



***Tiuj kiuj ricevas OS rete, ricevas ĝin pli frue, kaj samtempe la Federacio ŝparas la poŝtkoston. Ĉiuj gajnas! Nur bezoniĝas informi al Roy T. pri via retadreso.***

## Lee Valley Country Park

La suno sovaĝe brilegis tiun sabaton, la 18an de aŭgusto, kaj nur ses bravuloj, alveninte trajne aŭ aŭte, kuniĝis en la aŭtoparkejo apud la stacidomo de Cheshunt je la 11a por esplori la ĉirkaŭaĵojn. Unue ni promenis laŭ la kanalo, aŭ pli precize, laŭ la trenpado, riskante la vivon



pro la multaj biciklistoj. Mi demandas min kiom el ili enakviĝas. Ni baldaŭ transiris ponton kaj trovis nin sur vojetoj pli larĝaj, sed multe malpli ciklistplagataj. Tamen la suno daŭre bruladis kaj iu kiu ne portis ĉapelon tiom ruĝiĝis ke ni estis devigata trovi enombran sidlokon. Benkoj abundas, sed ĉiam en la suno. Finfine iu, senzorge kaj martire, ŝovis sin tra urtikbosko kaj trovis belegan lokon apud lago, ŝirmata kontraŭ la suno per la superelstaranta foliaro. Tie ni manĝis, trinkis, babilis kaj ĝuis la surlage flosantan birdaron kaj la ĉieajn libelojn, kaj eĉ krokodilo audiĝis! Refreŝigitaj, ni denove ekvagis kaj tro frue trovis nin adiaŭante en la aŭtoparkejo. Kia bela tago!



Federacia kunveno

**Layer Marney Tower**

**(inter Colĉestro kaj Tiptree)**

**Sabaton la 27an de oktobro**

**1100 – 1700h**

*Spertu tiun unikan, belan lokon kies posedanto estas filo de antaŭa esperantistino.*
*Ni aranĝos miksitan programon*
*Ĉiuj bonvejaj – lingvo nivelo ne gravas.*
*Kunportu propran manĝaĵon; trinkaĵoj provizotaj*
*Tagmono £4*

Federation Meeting


**Layer Marney Tower**

**(between Colchester and Tiptree)**

**Saturday 27th October**

**1100 – 1700h**

*Come and experience this beautiful, unique place, the owner of which is the son of a former Esperantist.*
*We will have our usual mixed programme.*
*All welcome, whatever your level.*
*Bring your own food – drinks provided*
*Day money £4*






**Follow Brown Signs from the B1022 Tiptree – Colchester Road**

## IMPORTANT

Our dear friends at Railtrack have done it again! Because of engineering works there is **NO SERVICE that day between Shenfield and Witham**.

If you are coming by train from the west –Liverpool St. - you would need to take the Southend train to Billericay, then on the replacement bus service to Witham. Services from the east are unaffected. The nearest station is Kelvedon.

If you intend coming by train, please contact Roy T (details at top of bulletin), and we will see if we can arrange to meet your train somewhere.

## Prezidantaj notoj

En julio mi trafis la ŝancon festi la 125an datrevenon de la "Unua Libro" en tute neesperanta maniero. Kelkaj el vi jam scias ke mi estas sonorilisto (iom freneza), kaj, kune kun Terry Page kaj londonano Matt Peperell, ankaŭ sonorilistoj, ni decidis celebri la okazon per specialan sonorigadon. La elektita loko estis Royston, estante preskaŭ egaldistance por ni ĉiuj, kaj facile aranĝita, ĉar la sonorilestron tie mi instruis antaŭ multaj jaroj. La rezulto estis "Quarter Peal" (proks. 45 minutojn) konsistante el 1,260 malsamaj kombinaĵoj en la "metodo" Yorkshire Surprise Major – ok sonoriloj. Ni dankas la kvin roystonsonorilistojn kiuj ebligis tiun provon.

Mi esperas ke vi venos amase al Layer Marney ĉar ĝi estas vere vidinda loko kaj vi certe ne bedaŭros la viziton.

**FRED BASSET de ALEX GRAHAM** *agnoske al Daily Mail*

